Resume: tre bunta kaj interesa brazila E-kongreso, bone organizita de niaj "*Campinas*" samideanoj. Niajn sincerajn gratulojn al la Loka Organiza Komitato! Ni jam saŭdadas pri Campinas, sed ni jam prepariĝas por la 42-a BKE, kiu okazos venontjare, en *Rio de Janeiro*, de la 8-a ĝis la 13-a de julio, kun la ĉeftemo "Cent Jaroj de E-Movado en Brazilo: Strategioj por la Estonto".

Informis: Aloisio Sartorato, Rio/Brazilo
<ludoviko44@yahoo.com.br>

Esperanto en Urugvajo

Urugvaja Esperanto-Societo [UES], pere de mi, volas inviti vian asocion kaj ĝiajn individuajn membrojn partopreni projekton, kiu celas plifortigi la latinamerikan interkunlaborado kaj reprezentadon ene de Esperantujo.

Ekde la 21-a de septembro de 2006, ni lanĉos Radio-Aktivan, interreta radi-stacio, kies tri ĉefaj celoj estos disvastigi Esperanton inter hispanoparolantoj, diskonigi Urugvajon kaj Latinamerikon inter geesperantistoj, kaj doni radi-spacon [almenaŭ interretan] al ĉiuj latinamerikaj esperantistaj landaj asocioj kaj landaj sekcioj de TEJO, por ke ili povu montri sin en Esperantujo. La projekto kalkulas je la apogo de la nuna prezidanto de UEA, s-ro Renato Corsetti.

La manieroj per kiuj via asocio povas profiti spacon en Radio Aktiva estas diversaj, de sendi al ni kelkajn tekstliniojn kun informaĵoj por ke ni dissendu ilin ene de nia movad-novaĵa spaco, ĝis havi propran programon kiun via asocio mem pretigos kaj sendos al ni kiel voĉarkivon, kiun ni elsendos kiel apartan programon en nia programaro. Inter ĉi tiujn du punktoj la eblecoj senfinas. Ankaŭ la frekvenco laŭ kiu vi sendos la materialojn al ni dependas de la bezonoj de via asocio, kaj povas esti de ĉiutage ĝis nur de temp' al tempo kiam ion novan okazas por informi.

Nur kontaktu nin por aranĝi la plej taŭgan manieron, per kiu via asocio povas profiti ĉi tiun radispacon.

Se iu aŭ kelkaj membroj de via asocio volas partopreni nian agadon -aldone al la partoprenado de via asocio-, li aŭ ŝi povas tion fari per la plej diversaj manieroj, nur bv. turni lin/ŝin al ni; sendube li/ŝi trovos sian plej ŝatatan manieron partopreni ĉi tiun projekton.

Kompreneble, nia oferto por via asocio estas tute senpaga. Ĉar la celo de Radio Aktiva estas apogi la agadon favore al Esperanto.

Ni atendas vian respondon, prefere sendita al:

<radioaktiva@googlegroups.com> aŭ <ues@esperanto.org.uy>. Ankaŭ demandojn aŭ klarigpetojn estas tre bonvenaj.

Mi salutas vin kaj la membraron de via asocio.

Elkore kaj samideane,

Daniel Bebelacqua
Respondeculo de Radio Aktiva,
je nomo de UES

Gaŭĉa Renkontiĝo en Porto Alegre

Gaŭĉa Esperanto-Asocio, [GEA], realigos de la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 2006, en *Porto Alegre*, la **8-an Gaŭĉan Renkontiĝon de Esperanto**, kies ĉefa temo estos “Kreiva diskonigado: pli da efiko per malpli da kosto”. La programo kalkulas je varieco de aktivaĵoj, ekz. prelegoj, atelieroj, E-ludoj, artaj momentoj kaj ankaŭ debato pri la ĉef-temo. Tiusence, oni havas la ĝojon inviti vin partopreni.

G E A,
<esperanto_gaucha@yahoo.com.br>

Internacie

Nova E-DVD

Nova projekto de E@I: DVD “Esperanto Elektronike” estis anoncita dum majo, kun la celo atingi ĝis la fino de junio antaŭmendojn de la Landaj Asocioj de UEA [kaj Landaj Sekcioj de TEJO], kio ebligos malmultekostan eldonon kaj prezon.

Sur la viki-paĝo:

<http://vikio.ikso.net/DVD> troveblas detalaj informoj pri la projekto, i.a. ke, tiu ĉi DVD estis kreita kun la celo informi pri Esperanto kaj prezenti/ebligi lerni E-on kaj ĝian kulturon.

La enhavon de la DVD kunmetas E@I, internacia junulara neregistrita organizaĵo, [okupiĝanta pri buntaj projektoj, rilataj al Edukado@Interreto], kies ĉefaj celoj estas instigi interkulturan lernadon, subteni lernadon kaj uzadon de interreto kaj lingvoj.

La nova DVD promesas la plej ampleksan kaj plej multflankan Esperantaĵojn –sur kiu troviĝos vortaroj, libroj, muziko, fotoj, filmetoj, ludoj, kursoj, informiloj, instruiloj, programoj, vikipedio, revuoj, fakaj verkoj k.s.

La projekton subtenis finance ankaŭ: ESF [*Esperantic Studies Foundation*], UEA, E@I kaj ID-fondaĵo. Al la projekto kontribuis per sia materialo multaj esperantistoj, el kiuj E@I dankas pro la afabla disponigo.

Peter Baláz, E@I-kunordiganto

“Esperanto” julio-aŭgusto 2006, p. 163

Reta Informado-Centro reaperas

Aperis nove-malnova paĝaro por informado pri Esperanto por esperantistoj.

Reta Informado-Centro [RIC], projekto kiu dum la lastaj monatoj “dormis”, reaperas en nova stilo kaj kun nova vizaĝo. Danke al kunlaboro de UEA kaj E@I [faka sekcio de TEJO] estis kreita nova hejmpaĝo por la centro, kiu celas esti “reta stokejo” de informiloj pri Esperanto. La paĝaro proponas sian spacon por jenaj tipoj de materialoj: informiloj, fotoj, bildoj, videoj kaj retligiloj. [Laŭ la bezono estos kreaĵaj pluaj submenuoj por ili]. Eblas ankaŭ diskuti la temojn de informado en la Diskutejo, en kiu eblas krei forumojn

laŭteme kaj laŭbezone. Plej grava trajto de la paĝaro tamen estas ebligo de enmetado de informiloj fare de la vizitantoj mem [t.n. “Alŝutejo”]. Tiel eblos atingi daŭran riĉigadon de la paĝaro per novaj informiloj.

Baldaŭ aldoniĝos ankaŭ la dokumentoj kaj informiloj de UEA. Ankaŭ viaj informiloj estas bonvenaj en la nova paĝaro: www.informado.net.

*Peter Baláz, E@I-kunordiganto,
<petro@ikso.net>*

“Esperanto” julio-aŭgusto 2006, p. 166

Esperanto en turismo internacia

Internacia Klubo “Esperantotur”, funkcia kadre de *Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo* en Bydgoszcz, Pollando, daŭrigas agadon de “Monda Turismo”, kiu dum 1972-2002 disvolvis internacian Esperanto-turismon.

Bedaŭrinde ne sufiĉas esperantistoj por aranĝi nur esperantistajn vojaĝojn, tamen valoras daŭrigi Esperanto-turismon - tiel ni promocias Esperanton kaj aranĝas grupajn vojaĝojn kun bonaj ofertoj kaj almenaŭ akcepteblaj prezoj kaj servoj. Se vi volas aliĝi al la E-vojaĝoj vi povas konsulti nian Kalendaron pri 20 vojaĝoj por la plej gravaj E-aranĝoj en 2006.

Studumo pri Turismo kaj Kulturo

Kadre de nia Centro en Bydgoszcz funkcias ankaŭ [ISTK], Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo – kaj Klerigo de Akademio Internacia de la Sciencoj [AIS] San Marino. Ĉitio estas 3-jara nepublika postmatureceksamina lernejo funkcia ekde 1991, laŭlege registrita ĉe Kuratorio pri Edukado en Bydgoszcz. En 1996 la studumo akiris la statuson de klerigo de la Akademio Internacia de la Sciencoj. En la studumo povas studi ĉiu persono, kiu finis 18-an

vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon. La studjaro 2006/2007 daŭros ekde septembro 2006 ĝis majo 2007.

Interesiĝantoj sin turni al:

stud@esperanto-turismo.com

Andrzej Grzebowski

Vicprezidanto de Internacia Centro pri

Kulturo kaj Turismo,

Prezidanto de Programkonsilio de

Internacia Studumo pri

Turismo kaj Kulturo,

Prezidanto de Internacia Klubo

“Esperantotur”

31-a Esperanto-Tagoj

de Bydgoszcz

Okaze de 660 jaroj de urbo Bydgoszcz, Pollando, kaj 15 jaroj de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, en Bydgoszcz, daŭris 10 tagojn [31-marto/9-aprilo 2006] la *31-a Esperanto-Tagoj de Bydgoszcz*, kun aliĝintoj el 22 landoj de Afriko, Azio kaj Eŭropo.

Dum la sesioj oni prezentis diverstemajn AIS-kursojn kaj oni partoprenis en kelkaj kulturaj aranĝoj.

Fine, post la ekzamenoj, la gestudentoj ricevis multajn atestojn kaj diplomojn, kiuj necesos por ilia plua studado por akiri ISTK-diplomojn. Ankaŭ bakalaŭrajn kaj magistrajn titolojn de Akademio Internacia de la Sciencoj [AIS]

Preskaŭ ĉiuj el pli ol 20 landoj jam aliĝis por la sekvanta studperiodo 2006/2007.

Krome, estis elektita nova 15-persona Konsilio de Internacia Klubo “Esperantotur”: prezidanto – Andrzej Grzebowski [PL], vicprezidantoj – Augusto Casquero de la Cruz [ES] kaj Liu Jianguo [CN], ĝenerala sekretario – Mara Timermane [LV], kasisto – Alojzy Szulc [PL], kaj membroj: Marcel

Delforge [BL], Daniela Emler [PL], Zdzizlaw Glaicar [PL], Bent Holm-Laursen [DK], Abraham Langoume [SN], Bojidar Leonov [BG], Agnieszka Maciag [PL], Mario José Miranda [AR], Moliere Ngangu Nduantoni [CD], Zelimir Pehar [TH-AU]. Okaze de la aranĝoj estis eldonita en Esperanto kaj pola lingvoj kolora plano de la urbo-centro de Bydgoszcz en 10 mil ekzempleroj, kiuj ricevos esperantistoj en pli ol 120 landoj de la mondo. Ĝi estos senpage ricevebla kun informoj pri ISTK studado, se vi sendos vian poŝtan adreson al:

Internacia Klubo “Esperantotur”

str. M. Skłodowskiej-Curie 10

PL 85-094 Bydgoszcz

Pollando

E-poŝto: info@esperanto-turismo.com

Internacia foto-konkurso

de "La Ondo de Esperanto"

Post ok sukcesaj konkursoj (ekde 1998) la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas al partopreno en la Naŭa Internacia Foto-konkurso. En la konkurso rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15X20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj unuekzemplere al la sekretario de la konkurso, *Halina Gorecka, ab. ja. 1205, RU-236039 Kaliningrad, Ruslando*. La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1-a decembro 2006. La konkursaĵoj devos esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto

kunsendata devos esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

*Halina Gorecka,
sekretario de la konkurso*

E-Disvastigo

Farbskatol': Nova aero por Esperanto

Farbskatol' estas interesa ttt-ejo, sur kiu ankaŭ argentinano Carlos Devizia kunlaboris kaj kreis "Kokido kun Migdaloj"

Tiuj, kiuj ŝatas filmojn, povas esti kontentaj, speciale se vi ŝatas Esperantajn filmojn.

De kelkaj monatoj ni povas ĝui novan ttt-ejon, kiu montras Esperantajn videojn. Tiu loko estas Farbskatol' <http://farbskatol.net>, kiu estis kreita de du francaj esperantistoj: Axel Rousseau kaj Emmanuelle Richard.

En mallonga tempo ili kreis tre interesan ttt-ejon kaj ricevas kunlaboraĵojn de diversaj esperantistoj. Farbskatol' ne petas monon por funkcii, nur ideojn ĝi petas. Ĝuste tio, laŭ mia opinio, faras ĉi tiun projekton kredinda kaj serioza.

En tiu ttt-ejo vi povas vidi videojn pri kuirarto, E-movado, humuro, porinfana elsendo, muziko, fikcio, ktp.

Uzante diversajn teknikojn ili montras [kaj akceptas por montrado] filmojn pri la plej diversaj aferoj. Tiel vi povas spekti, ekzemple, animitan filmeton, humuran skeĉon aŭ tre profesion elsendon pri kuirarto.



ero de "Kokido kun Migdalo"

La daŭro por ĉiuj filmoj estas diversaj. La plej longaj daŭras proksimume kvin ĝis dek minutojn, kaj la plej mallonga konsistas nur el unu sceno. Do, ankaŭ pri tempo oni havas diversajn eblojn.

Oni povas elŝuti kelkajn el la filmoj. [La aŭtoro de ĉiu filmo decidas tion].

La spektantaro povas voĉdoni pri la filmoj kaj aldoni komentojn, ĉu ili ŝatis aŭ ne la videojn, kaj kial.

Plej gravas, ke la filmetoj estas faritaj de esperantistoj el la plej diversaj lokoj el la mondo.

Mi kredas ke Farbskatol' estas freŝaera enspiro por la Esperanto-movado.

*Carlos Devizia, [Buenos Aires]
<carlosdevizia@yahoo.com.ar>*

FORPASO

AEL kondolencas informante pri la forpaso de nia karega kaj elstara s-ano Floreal Villar (1920-2006) kiu dum pli ol sepdeko da jaroj estis membro aktiva de la argentina Esperanto-movado, en kies asocioj, krom UEA kaj SAT, sindoneme kaj senpaŭze laboradis.

Ni disvastigu Esperanton pli trafe

*D-ro Werner Schad, [1926-2006],
elstara argentina esperantisto,
iama sekretario de
Barilochea Esperanto-Rondo,
aperigis tiun ĉi artikolon en la revuo
"Brazila Esperantisto"
n-ro 304 de septembro 1998:
"Esperanto: precizeco, riĉeco, facileco"
kaj per ĝi ni omaĝas lin.*

Ni disvastigu Esperanton pli trafe

La sekvantaj linioj estas dediĉitaj al tiuj kiuj luktas heroe kontraŭ indiferenteco kaj stulteco.

1) Etikaj kaj praktikaj kialoj:

Ne justas ke bonintenca homo povas nek kompreni aliulon, nek esti komprenata nur ĉar li (ŝi) ne regas ties lingvon.

Memkompreneble racias, ke ĉiuj homoj interkomunikiĝu per la plej facila, preciza kaj taŭga lingvo.

Verŝajne neniu normale inteligenta persono dubas pri la avantaĝoj de tia interkomunikado por scienco, ekonomio, politiko, religio, sporto, amuzado kaj amo. El tio evidentiĝas, ke aktivaj esperantistoj estas avangardo de serioze progresema homaro. Klara konscio pri tio instigas respondecajn homojn al agado.

2) Realo de la situacio:

Seriozaj kaj trafe aktivaj esperantistoj estas minoritato ene de la esperanto-malplimulto. Sed eĉ tiuj kiuj konsideras esperanton nur duaranga ŝatokupo, fortigas la movadon ekonomie, politike, numere kaj en ĝia ekstera propaganda efiko.

Kiuj estas gravaj faktoj malhelpantan la enkondukon de nia lingvo? Sendube la tute normala homa indiferenteco kaj inerto. Al ili sumiĝas la pardonebla kontraŭa intereso de tiuj, kies lingvon superregas nuntempe en la internaciaj organizaĵoj. Estas kompreneble, ke personoj, kiuj naskiĝis kun lingvaj prerogativoj, ne ŝatas ilin perdi. Nur tre noblaj karakteroj pretas rezigni pri privilegioj, favore al la homara justeco. Sed

senĉagrena komprenemo ebligas superi tiujn obstaklojn.

Malpacienca elreviĝo de esperanto-varbantoj eviteblas per tia supozo: El cent personoj, al kiuj ni parolas pri esperanto, eble unu interesiĝas. El cent kiuj interesiĝas, eble unu komencas lerni la lingvon. El cent kiuj lernas, eble unu enviciĝas aktive en la movado. - Kvankam tiaj taksitaj proporcioj ne estas ekzaktaj, ili helpas almenaŭ eviti tro grandajn esperojn. Nur firma konvinko, persista obstino kaj trafa agado koncedos sukceson.

Multaj homoj nur interesiĝas pri io, se tio rilatas al personaj avantaĝoj. Tiuj kun pli alta kvalito ankaŭ interesiĝas se pozitivaj kaj noblaj konceptoj rilatiĝas kun la propono. Oni pripensu kaj utiligu tian realon dum la esperanto-varbado.

3) Prepara laboro:

Aŭdinte kaj leginte ion tre ofte, homoj ĝin akceptas pli facile. La reklamado de grandaj firmaoj pruvas tion. Do per koncizaj sloganoj ofte publikigataj ni povus helpi la disvastigon de esperanto. Jen kelkaj ekzemploj:

ESPERANTO: la lingvo de la 21-a jarcento.

ESPERANTO: monda sukceso. Partoprenu!

ESPERANTO: kaj vi havos amikojn en cent landoj.

ESPERANTO: kaj vi trovos ŝancojn en 5 kontinentoj.

Ofta menciado de esperanto ie ajn favoras multe la postan semadon de la lingvo. Tiuj, kiuj informiĝas pri esperanto el diversaj fontoj, pli facile konvinkiĝas. En la revuo "Esperanto" de UEA, n-ro 1094, László Szilvási rekomendas trafegon "Senpagan esperanto-reklamon":

a) En multaj laborejoj kaj ankaŭ en lernejoj, universitatoj, ekzistas publikaj murtabuloj por afiŝado. Pendigu taŭgan esperanto-materialon - mallongan, sed atentokaptan kaj belaspektan.

b) En multaj programoj de radio kaj televido oni ebligas altelefonadon al aŭskultantoj. Kuraĝu partopreni ankaŭ vi! Dum via parolo mencienu vian esperantistecon aŭ esperanton!

c) Multaj gazetoj aperigas leterojn de legantoj. Al multaj temoj oni povas rilatigi lingvajn aferojn kaj esperanton.

d) Anoncgazetoj postulas malgrandajn sumojn. Do indas aperigi tie anoncetojn pri esperanto-instruado, ktp.

e) Apud trafikplenaj vojoj ofte ebligas pendigi tabulon pri esperanto. Sed ĝi devas aspekti okulfrape kaj bele!

f) Agu mem kaj instigu agi aliajn! Estu fieraj pri via esperantisteco!

4) Individua varbado:

Konvenas ke buŝa persona varbado enkroĉiĝu en jam ekzistantaj interesojn: filatelio, scienco, sporto, ktp. tiamaniere esperanto rolas komence kiel helpilo evoluanta eble al unuaranga intereso. Rekomendindas agadi taktoplene kaj ne laciĝi aŭskultanton. Alie la efekto negativiĝus.

5) Instruo kaj lernigado:

Instruo kaj lernigado estu adaptotaj al la mensa nivelo de la lernantoj. Tafa instruo por intelekto ne tre lertaj homoj, enuigos kaj forpelos intelekto kapablajn. Tafa instruo por personoj, kiuj jam lernis (iomete almenaŭ) alian lingvon, senkuraĝigas ofte neklerulojn. Ofte malfacilas apliki la ĝustan metodon en kolektivaj kursoj, dum en individua instruo tio rezultas pli facile. Ĝenerale rekomendindas celi la pli klerajn lernantojn. Ties sukceso kaj konstato estas ja pli verŝajna.

Kompreneble la supraj konsiloj utilas nur por kursoj kie la instruisto kaj la lernantoj estas samlingvanoj. Alie la metodo Cseh (aŭ simila) estas necesa. Indiki la gravecon de memlernado, disponigi instigan materialon pliampleksas ege la instruan efikon. Sendube la talento de la instruisto por adaptiĝi al la nivelo de la lernanto gravas tiom, kiom ties kapablo kaj konstanto.

6) Vivtenado de la intereso:

Personaj avantaĝoj, ĉu ekonomiaj, ĉu prestiĝaj, ĉu alispecaj estas normala motivo en homoj. Erare estas kondamni ĝenerale tian realon. Konvenas pli utiligi ĝin, direkti ĝin al konstruaj celoj. Ĉi tiuj ne mankas en nia movado. Ivo Lapenna jam rekomendis en la libro "Esperanto en perspektivo": "...flegi kaj evoluigi ĉion pozitivan firme kaj senkompromise liberiĝi de ĉiuj negativaĵoj...".

Sekve gravas, ke ni apogu kaj favoru ĉion konstruan evitante kverelojn kaj akran polemikon. Erarojn kaj mispaŝojn oni povas ĝustigi taktoplene per prudentaj konsiloj.

La etoso en klubaj kunsidoj aŭ allogas aŭ forpuŝas homojn, kiuj interesiĝas pri esperanto. Do gravas, ke oni faru tiajn kunvenojn kiel eble plej agrablajn. Diverĝo de opinioj ofte solveblas pli bone inter du aŭ tri personoj, anstataŭ inkludi la tuton de la klubanoj aŭ rondanoj.

Ĉie ajn, kie troviĝas du aŭ pli da esperantistoj, ili devus kunsidi almenaŭ po unufoje monate. Ne nur sento de esperantista solidareco tiel fortiĝas: ankaŭ oni povas praktiki la lingvon kaj esplori eblecojn disvastigi ĝin pli efike. Strikta trudo de esperanto povas forpeli tiujn, kiu ne bone regas la lingvon. Tial rezultas pli prudente praktiki esperanto-konversacion en simil-nivelaj gruperoj. Tiel oni ne fortimigas unuopulojn pro vundita memestimo aŭ enuo. Pruntedoni aŭ disdonaci esperanto-publikaĵojn ofte akumulitajn en polvaj staploj stimulas la legadon kaj la reklamon. Abonigi revuojn, aŭskultigi Esperanto-radio-elsendojn, membrigi interesulojn en organizaĵoj, per ĉi ĉio ni kultivas kaj flegas nian lingvon.

7) Aktivigo de lernintoj:

Lernintoj, kiuj kutime klerigas sin esperantiste, certe estas laŭdindaj. Sed krome justas, ke ili diskonigu la lingvon kun siaj kvalito kaj ideo. Oni ne pravus profiti la akiritan konon nur por propra ĝuo. Justas helpi al aliaj, ke ili komprenu tion, kion esperantistoj jam perceptis. Tial rekomendindas: Propagandi ĉiam, ĉie, ĉiel - kiam, kie kiel eble.

*D-ro Werner Schad
Bariloche, Provincia de Río Negro
República Argentina*

“Karaj gesamideanoj, ni ĉiam memoros verdstele dankeme al tiu grava profesoro kaj doktoro Werner, kiu estis nia amiko, ĉies amiko”.

Kompreno

El la Leterkesto

Pri la libro...

“Dankon al vi pro la sendita reta versio de *Argentina E-Vento* kun informo pri la sukcesa vendiĝo de "Vojaĝo en Esperantlando". Mi esperas, ke tiu informo altigis intereson de argentinaj esperantistoj al mia libro.

Tio estas speciale agrabla, ĉar Argentino ne estas por mi fremda lando: antaŭ centoj da jaroj ĉi tie loĝis dum kelkaj jaroj mia avo David Kolker kaj, verŝajne, nun loĝas idoj de du kuzoj de mia avino.

Mi plusendis vian gazeton al miaj lernantoj kaj lernintoj en diversaj landoj.

Vidu la renovigitan paĝon kun opinioj pri "Vojaĝo en Esperantlando":

<http://ling.cuc.edu.cn/htliu/vrec.asp>

Amike, Boris <b_kolker@yahoo.com>

Tra la lando

E-kurso en Rosario

Rosaria Esperanto-Asocio [REA], anoncas sian bazan E-kurson gvidata de s-anino Alicia Palmucci.

Ĝi okazas de la 4-a de aŭgusto 2006, ĉiu vendredo, de 18H00 ĝis 20H00, en la sidejo de REA, strato *Santa Fe 955 of. 4, Rosario*.

*Ernesto Rubén Moreira Martin
P/ la CD, Vocal 1°*

Internacie

Sukcesa Universala Kongreso

Tre sukcese okazis en Florenco, [Italio], la 91-a Universala Kongreso de Esperanto. Pliaj informoj aperos en nia sekvanta numero.

**Via kontribuo estas
bonvena**

Distraĵoj

- Humuro - amuzaĵoj -
- kuriozaĵoj -

La ĉeno de la feliĉeco

Ĉi tiu ĉeno estas farita per viroj edziĝintaj kaj laciĝintaj.

Ne estas bezone mono.

Sendu 5 kopiojn al 5 konfidega amikoj kaj sekve faru pakaĵon kun via edzino, kaj sendu al unua amiko de la listo, metante via nomo en lasta loko.

Tiel vi ricevus 15.626 virinojn, iu povus esti interesege, aŭ almenaŭ malsama al la via. ĵ ĵ ĵ ne interrompu la ĉenon !!!

Edzo interrompis la ĉenon kaj ricevis denove sian edzinon!

Konulo mia jam ricevis 10 virinojn, kvankam hodiaŭ mi ĉeestis en lia entombigo, li havis siajn lipojn ridetecon, kiun mi vidis nenian dum li vivis.

Subtenu la ĉenon kaj vi povos morti kontenta!

Karlo: <czubin@intramed.net.ar>

Rido dum funeralo

Grava kor-kuracisto [tio estas kardiologiisto] mortis kaj liaj geamikoj kaj familianoj decidis fari grandan kaj spektaklan funeralon por li. En la preĝejo malantaŭ la ĉerko estis grandega koro kovrita de floroj. Post la funebraj paroloj kaj la elegio, du pordegoj malfermiĝis en la ega koro, kaj la ĉerko trankvile eniris la koron per mekanika sistemo, dum aŭskultigado de bela muziko. Finfine, kiam la ĉerko estis en la korego, ĝi fermiĝis, kaj iu familiano diris, ke finfine li porĉiame tie ripozos. Tiam, unu el la amikoj de la mortinto ekridis. Ĉiuj rigardis lin, kaj li honteme diris:

- Mi tre bedaŭras pro mia ekrido... Mi ekpensis pri mia funeralo... Mi estas ginekologiisto!

Antaŭen n-ro 36, 2006 [ES]

A n u n c i o s

AEL necesita su adhesión

Si Ud desea abonar su adhesión o colaborar con las tareas de AEL envíe su donación mediante depósito en Banco Francés, [sin costo], cuenta N° 147-005789/3, a nombre de Alcides Pieter Wentinck
DNI 93.709.394
Calle Libertad 3226
B1602DJD Florida, Vicente López
Buenos Aires
y luego indefectiblemente informe sobre dicha operación a:
<wanelec@sion.com>

Si desea colaborar con la edición y distribución de la revista *Argentina E-Vento* también puede enviar su contribución mediante el “Banco Patagonia”, depositando su aporte en “Caja de Ahorro” suc. 110, Sáenz Peña, cuenta N° 394101439, del Sr. Oscar C. Monge, [sólo se descontará \$4,84 como gasto bancario por depósito].

Rogamos siempre informar sobre su operación a esta redacción:
<rubendiaconu@yahoo.com.ar>.

Agradecimientos

Por las adhesiones y colaboraciones recibidas AEL agradece a: A. Aranda [Chaco], NN [Chaco], R. Calógero [Neuquén], M. Gunella [Salta], E. R. Moreira Martín [Santa Fe]

AEL Jarkotizo

Individua Membro:.....\$ 20,00
Junulo kaj Emerito:.....\$ 10,00
Virtuala Membro kaj
donacoj: laŭvole

Libroservo

Para obtener material impreso en y/o sobre Esperanto consulte al Libroservo de AEL. Visite nuestra página Web ó escriba a:
Mario J. Miranda
Paraguay 2357
C1121ABK Capital Federal
Buenos Aires

Ni ricevis

La Redakcio kore dankas pro jenaj E-ricevaĵoj: Esperanto [NL], Heroldo de Esperanto [CH], La KancerKliniko [FR], Avanco [CU], La Espero [SE], Bazarro [RO], Antaŭen [ES], “Esperantotur”-Informilo [PL].

Se via sendo ne aperas Bv. informi al la Redakcio. Vd. p. 2

iOportunidad!

Si desea enriquecer su biblioteca solicite algunos de estos libros:
Esperanta Antologio, 1887-1981, 887 p. (12 dól.), oferta sólo 25 pesos [*].
Lexicón Sopena, Esperanto-Español Español-Esperanto. 384 p. (bolsillo) (8 dól.), oferta sólo 20 pesos [*].
Luĉifero, Mihai Eminescu, 48 p. (trad. al E-o) oferta 10 pesos [*].

[*] Más gastos de envío.
Contacte a la redacción. Ver pág. 2

Internacie

Novaj eldonaĵoj de UEA lanĉitaj en Florenco

Kiel la plej granda ĉiujara kolektiĝo de la parolantoj de Esperanto, Universala Kongreso de Esperanto estas natura okazo por lanĉi novajn librojn. UEA prezentos en la ĉi-jara UK en Florenco plurajn novajn titolojn. La plej fama el ili estas la nova eldono de la Zamenhofa traduko de "Hamleto, reĝido de Danujo". Ankaŭ alia ŝekspiraĵo: "La vintra fabelo", tradukita de Humphrey Tonkin kaj lanĉita en majo.

Humphrey Tonkin estas ĉi-jare la plej produktema aŭtoro-tradukinto de la eldona fako de UEA. En Florenco li prezentos ankaŭ sian primovadan verkon, "Lingvo kaj popolo", kiu origine estis verkita kiel prelegaro por la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano. Surbaze de sia 50-jara sperto pri Esperanto-aktivo Tonkin diskutas kaj diskutigas en ĝi vastan gamon da aktualaj problemoj de UEA kaj de la tuta Esperanto-movado. Temas pri nemal-havebla verko por ĉiu aktivulo.

Speciale por la Florenca UK aperos dua eldono de la kortuŝa libreto "La lastaj tagoj de Ada, Aduŝka" de Gian Carlo Fighiera.

En ĝi la aŭtoro dividas kun la leganto siajn rememorojn pri la lastaj vivotagoj de sia edzino Ada Fighiera-Sikorska, forpasinta antaŭ dek jaroj.

Dum 35 jaroj Ada estis redaktoro de "Heroldo de Esperanto", kiu dum ŝia periodo ankoraŭ estis la ĉefa internacia Esperanto-gazeto apud la revuo "Esperanto" de UEA. Francisco L. Veuthey dezajnis por la nova eldono belan grafikan veston.

En la Esperanta kaj franclingva serioj de Esperanto-dokumentoj aldoniĝas al la pli frue aperintaj intervjuoj kun la famaj lingvistoj André Martinet ("Pri kelkaj problemoj de interlingvistiko", 1993) kaj Umberto Eco ("Esperanto kaj la estonteca plurlingvismo", 1994) la kajero "Esperanto kaj lingva diverseco".

Temas pri teksto de interparolo, kiun François Lo Jacomo havis kun la eminenta franca lingvisto Claude Hagège pri diversaj aspektoj de lingva politiko, internacia lingvo kaj Esperanto.

Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 238

Redakcio de Argentina E-Ligo: Calles 119 y 122, AR-H3700FTT Pres.R. Sáenz Peña, Argentino



Sr/ra :